******************************************************************************

INSTRU-CIRKULERO febr. 2006 (IC-7)

Neregula informilo pri E-instruado, novaĵoj, projektoj, renkontiĝoj

==================================================================

Enhavo:

I.. UEA/ILEI ekzamenoj en Germanio en aprilo
II. Fakkunveno dum la 83a GEK en Braunschweig
III. Esperanto en lernejoj
1.. Subtenu novan lernejan grupon
2. Detale pri la AKEL-projekto
IV. Peticio por subteni E-on
V. Studsesioj en Herzberg en 2006

_ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _

I. ILEI-EKZAMENOJ

ALIĜO: eluzu ankaŭ vi la bonan ŝancon trapasi ILEI-ekzamenon nun en Germanio, inter 14-16 aprilo (paralele kun PSI (10-17 aprilo) en St, Andreasberg) Bv. SKRIBE aliĝi per sendo de la jena teksto al la retadreso: esperanto-zentrum @web.de: Mi aliĝas al la elementa/meza ekzameno de UEA/ILEI inter 14-16 aprilo 2006.

Ĉar venis demandoj pri la enhavo, postuloj de ILEI-ekzamenoj, mi nun montras kelkajn tipajn demandojn el la parola ekzameno.

(Ne forgesu: inter 10-17 aprilo okazos ankaŭ preparkurso kun favoraj partoprenkondiĉoj!)

Elementa nivelo:

-Kio estas "fakasocio"? Kion fakasocio kutime faras? Kio estas la rolo de fakasocioj en la Esperanto-kulturo?

-Klarigu la t.n. internan ideon de esperantismo, uzante ilustre unu aŭ pli el la poemoj de L. L. Zamenhof.

Meza nivelo:

-Elektu originalan Esperantan romanon unue eldonitan post 1960, kiun vi estas leginta. Donu kelkajn informojn pri ĝia aŭtoro, resumu ĝian enhavon, kaj prikomentu ĝian stilon.

-Kiam kaj kie okazis la unua Universala Kongreso de Esperanto? Kiel ĝi siatempe gravis en la Esperanta mondo?

II. FAKKUNSIDO de E-instruantoj, instruistoj, interesiĝantoj dum 83a GEK en Braunschweig (2-5 junio, 2006). Ĉu vi jam aliĝis al la kongreso de la 100-jara GEA?

Fakkunveno de la Asocio de Germanaj E-Instruistoj: AGEI alvokas ĉiujn koncernitojn por partopreni la kongreson kaj helpi reaktivigi tiun fakan asocion! Celoj: renovigo de la statuto, novmembriĝo, elekto de funkciuloj, revigligo de enlanda kaj internacia agado, kunlaboro kun ILEI, planoj, decidoj por la futuro. Venu, helpu, kunagu!

(La malnovaj AGEI-membroj ricevos apartan invitilon.)

III. Esperanto en lernejoj

1. HELPO-PETO: Jen alvoko de hungara lernejo, kies ĵus-komancitan E-laboron kaj planatan ekspozicion vi povas bone subteni per sendado de salutmesaĝo al la lernejo! (Ili planas aliĝi al la ĝemelurba modelprojekto, lerneja interŝanĝo inter Herzberg kaj Gora.)

Karaj samideanoj tra la mondo!

En urbeto Tiszafüred, Hungario, meze de januaro estis fondita nova Esperanto-klubo por gejunuloj havantaj 13-18 jarojn. Por ke ili vidu: Esperanto estas lingvo vivanta, bv. sendi al ni salutkartojn el viaj landoj, urboj por saluti ilin kaj Esperantlingve kaj en via gepatra lingvo! Antaŭdankon!

Julianna Vas-Szegedi, klubestrino: Esperanto-Klubo/Eszperanto Klub
Kossuth Lajos Gimnázium H-5350 Tiszafüred, Baross u.36. Hungario

Krome vi povas komenci korespondadon ankaŭ rekte kun la gelernantoj:

La klubanoj estas ege diligentaj kaj interesemaj, ili volus interamikiĝi pere de la Esperanto, do, skribu al ni ĉiu, kiu ŝatus ekkoni Hungarion kaj la viglajn infanojn!

2. AKEL-projekto
Ĵus finiĝis aliĝperiodo por 2006. Kolektu informojn, serĉu vojojn por financa subteno de via lerneja E-instruado. Bona ŝanco por lernejoj uzi Esperanton kaj havi subvencion de EU enkadre de "Socrates"-projekto AKEL (pli da informoj en la januara 2006 numero de revuo Esperanto). Nepre informiĝu pri tiu interesa projekto de la Eŭropa Unio, klare kaj koncize prezentita en la ĉi-subaj retpaĝoj.
AKEL (Alternativa Komunikado inter la Eŭropaj- kaj EFTA-Lernejoj)
kontaktoj: ludoviko@portugalmail.pt, silkovojo@aliceposta.it, http://lingvo.org/akel, www.edukado.net
Inf. sendita de Vittorio Madella silkovojo@aliceposta.it

Eĉ, se vi ne partoprenos ĝin, gravas informiĝadi kaj informadi esperantistojn kaj neesperantistojn pri tiu kaj aliaj modernaj aplikoj de Esperanto.
Jen klarigcele anoncoparto, kiu aperis ĉe edukado.net, http://www.edukado.net/anoncoj/13930 kaj kies alŝutebla PDF-parto inter aliaj informoj diras la sekvon:

PROJEKTO KOMENIUS
Eùropa Unio starigas plurajn dispoziciojn por ebligi interŝanĝojn inter eùropanoj. El ili, unu koncernas bazajn lernejojn : Komenius 1
CELOJ :
Komenius 1 klopodas firmigi la eùropan dimension en edukado ; pro tio Europa Unio subvencias kooperadon inter lernejoj.
Komenius1 enhavas plurajn celoj :
- plibonigi la kvaliton de la edukado kaj formado de instruistoj
- kreskigi la bazajn kompetentojn kaj lingvan instruadon
- disvolvi la uzadon de komputiko
- plibonigi instruadon de matematikoj kaj sciencoj
- disvolvi aktivan europan civitecon

Tri specojn da projekto oni povas elekti :
Lernejaj projektoj, Lingvaj projektoj, Interŝanĝo pri pedagogio
KONDIĈOJ :
Tri lernejoj minimume, sed prefere pli, devas kunlabori. Almenaŭ unu el ili situiĝas en E .U., la aliaj povas esti EU-kandidatoj. La aktivadoj estas planitaj por 3 jaroj.

IV. Jen informoj pri PETICIO antaŭ nelonge lanĉita de Martha Cardenas (detaloj pr ŝi ĉe http://www.garymar.org). La peticio por E-o celas atingi ke UN akceptu Esperanton kiel internacian lingvon. Necesas 1 miliono da subskriboj. La formularo estas plenigebla ene de kelkaj sekundoj.
Bv.viziti la hejmpaĝon kaj decidi pri via apogo.
http://www.petitionspot.com/petitions/ESPERANTO

V. KLERIGADO kaj pluklerigado: Germana Esperanto-Centro, Klerigejo de GEA anoncas novan serion de klerigkursoj (Studsesioj) en 2006. Post enskribiĝo, regula partopreno en la prelegoj, trejnkursoj, plenumo de taskoj, kolektado de kreditpoentoj, trapaso de ekzamenoj oni povas akiri atestilon, kaj fariĝi klubgvidanto, kursestro, E-instruanto.
1. 17-19 FEBRUARO
2. 10-17 APRILO (PSI) 2x, ILEI elementa/meza ekzamenoj
3. 16-18 JUNIO
4. 09.30-03.10 OKTOBRO Pedagogiaj Tagoj, ekzamenoj
5. 8-10 DECEMBRO

IV. ALVOKO al kontribuo: Ankaŭ viaj informoj, alvokoj, fakaj materialoj, ktp. estas bonvenaj por la sekva cirkulero.

Kun multaj salutoj,

Zsofia Korody
GEA-komisiito por instruado